

Lord George Gordon Byron ,
 Nokt' en la koro

tradukita de Leopold Blumental

Nokt' en la koro . . . la harpo kuŝas . . .
 Vi tuj ekkantu, kantisto!
 Se vi la kordojn de l' harpo tuŝas,
 Vi miron faras, artisto.

Se kor' ankoraŭ havas esperon,
 Per kanto ĝi revekiĝos;
 Se la okulo kaŝis larmeron,
 Denove ĝi eklarmiĝos.

Kant' via tondru mondan doloron!
 La gajon mi ne komprenos . . .
 Vi min plorigu, movu la koron,
 Aŭ mia brust' ne eltenos.

Ĝi de suferoj longe manĝiĝis,
 Silentan premis la ĉeno! . . .
 La tempo venis . . . ĝi jam pleniĝis
 Kiel vazet' de veneno.

*Traduko de la Angla poemo "My soul is dark" de LORD GEORGE GORDON BYRON (*1788-01-22 - †1824-04-18) en Esperanton de LEOPOLD BLUMENTAL (Leo Belmont, *1865-03-08 - †1941-10-19).*

Arg-1018-2061 (2014-05-20 16:42:26)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejn http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont. La poemo-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php> kaj en http://eo.wikisource.org/wiki/Fundamenta_Krestomatia/Nokt'_en_la_koro.